La distra parto de la programo estis ampleksa, kun trupa prezentado de humura poemo far Corinne Goddard Engelmann pri diversaj bestoj, kiujn laŭvice reprezentis la plurdek trupanoj. Kantis en laŭkutime belega voĉo Alberta Casey, kaj kelkajn malnovajn kaj kelkajn tute novajn originalaĵojn kantis Brian Neil Burg. Deklamon de Schwartz-poemoj faris Lou kaj Ellie Stein.

Propran tradukon de la plej fama Poe-poemo, "La Korvo", prezentis Mack Dougherty; temas verŝajne pri la kvara provo redoni ĝin en la internacia lingvo.

Ankaŭ el vidpunkto de eksteraj rilatoj la konferenco havis sukcesojn. Venis oficiala invito de urbestro Pete Wilson kaj aliaj urbaj gravuloj. La neelĉerpebla Alberta Casey havis televidan intervjuon, kaj raportojn pri la konferenco faris ankaŭ la lokaj ĵurnalo kaj televida novaĵprogramo.

La Unua Konferenco de Esperanta Mez-usona Organizaĵo (EMO) okazis ĉe Sud-ilinojsa Universitato en Carbondale, 1976.05.01-02. Ĉe tiu fonda konferenco de EMO elektigis eksa profesia tradukisto Mark Haskell kiel prezidanto. Li prelegis pri ldo kaj interlingvistiko.

La konferencanoj, el Ilinojs, Indianio kaj Iovao, ĝuis tri ekskursojn, en vagonaro, laŭ avenuo, kaj al historia indiana vilaĝo Makanda.

La distra programo konsistis el poemoj, ŝercoj, kantoj, kaj rigida monologo de la fama spertulo pri naciaj akcentoj Duncan Charters. Vaste konata ankaŭ kiel metodologo, li faris ankaŭ prezentaĵon de diversaj metodoj utiligeblaj en Esperanto-instruado.

Inter la estontaj celoj de EMO estas starigo de intensa kurso, verŝajne ĉe Kolegio Principia sub Duncan Charters.

## DONACINTOJ AL ELNA

(1976.02.02/05.15)

Margaret Barkley	Louis Obreczian
D-ro Richard Borkow	Jim H. Parks
Peter H. Burleigh	Foster Parmelee
D-ro Stefan Chobanoff	John W. Posten
Albert & Sara Ann Estling	Charles R.L. Power
Ella Gibson	Thomas S. Reed
S. Colum Gilfillan	Helen A. Scherer
Doris K. Googin	William & Catherine Schulze
Kalifornia Esperanto-Konferenco	SFERO
Sally Lawton	Sidney V. Steinberg
Peggy Linker	Francis H. Sumner
Cornelius J. McKown	Fritz Uhlig (In Memory of Helen)
Mill Valley Rondeto	Doris Vallon
Raymond R. Neri	Elfreda D. Walters
D-ro Gertrude Novak	Arthur J. Wendler
	Pearl Wegher

Sinceran dankon al ĉi tiuj subtenantoj de ELNA kaj tiel de la Esperanto-movado en Usono!!



Alberta Casey montras sian Zamenhof-buston.

## APERAS LA BAZA RADIKARO

En 1967 la Akademio de Esperanto sciigis la gazetaron pri preparo de Baza Radikaro Oficiala, kies celo estis aparte proponi la vulgaran aŭ lernolibran vortprovizon, tiel ke laŭeble la vortaro de la lernolibroj fariĝu tute unueca, kaj ĉiu povu certe scii, kian vortkonon oni povas supozi ĉe iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro.

Tiu Radikaro ĵus aperis kiel parto de *Aktoj de la Akademio II, 1968-1974*. Ĝi entenas 2418 elementojn, dividitajn en naŭ grupoj laŭ graveco.

La kriteriojn por akcepto de elementoj en la Radikaron eksplikas detala enkonduko.

Krom la Baza Radikaro Oficiala, aperas en la broŝuro la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro, diversaj komunikoj al la gazetaro, membrolisto, kaj du "neoficialaj" artikoloj pri tradiciaj Akademijaj temoj. Raymond Schwartz inventaras la pasivajn participojn en *La Rabistoj* de Schiller (tr. Zamenhof), komparante germanan kaj esperantan tekstojn por trovi, ke Zamenhof estis itisto. A. Albault malkovras la fakton, ke ankoraŭ ne regas plena unueco rilate landnomojn.

La broŝuro estos baldaŭ havebla ĉe la libroservo de ELNA (79 p., \$4.50 plus sendokostoj).

## ABONOJN

al ĉiuj esperantaj periodaĵoj de la mondo peras Esperanta Lingva Serva Kompanio, 3300 N. Lake Shore Dr. 6-D, Chicago IL 60657. Sendu afrankitan koverton por prezlisto de 78 gazetoj el 26 landoj.

\*\*\*\*\* Booklist Appendix #10, May-June 1976 \*\*\*\*\*

CLIENTS: To expedite service please note corrections and deletions in appendices 5-9 and below. Add \$1.00 shipping (\$2.00 outside U.S.) to all orders. All payment must be made in US\$. Californians, please add sales tax. Send all orders to ELNA Book Service, P.O. Box 508, Burlingame, CA 94010.

All books are paperbound unless otherwise noted ("bound" = hardbound).

NO. 10

CORRECTIONS AND DELETIONS (numbers refer to pages of current catalogue)

7 Radio-Amatora Esperanto-Terminaro	DELETE	25 Provo alfronti la vivon	2.50
8 Doktoro kaj lingvo Esperanto	22.50	30 Vivo de Nia Sinjoro Jesuo	DELETE
Special price to ELNA members:	20.00	35 Ĉu vi parolas Esperante? (records)	17.50
9 Esprimo de sentoj en Esperanto	DELETE	36 Cultural Value of Esperanto (Gregor)	DELETE
12 Aventuroj de Marteno Drake	DELETE	Encyclopædia Britannica reprint	DELETE
13 Fabeloj, vol. 4 (erroneously listed as vol. 2)	DELETE	37 Insigniae 3, 4, 8	DELETE
La faraono	DELETE	Tea towel (flag design)	DELETE
18 Saltego trans jarmiloj (bd. 1924 ed.)	DELETE	Postcard: Nova Talento cup	5/10¢
Ses noveloj	DELETE	38 Marvirineto	4.25
Spleno de Parizo	6.50	Novaj vestoj de la imperiestro	4.25
19 Taglibro de Anne Frank	DELETE	40 Spleno de Parizo	6.50
24 La infana raso	3.75	Appx 5: La junaj detektivoj	1.20
Libro de amo	10.00	Appx 7: Hungara Vivo (back issues)	DELETE

Esperanto movement and history, linguistics, Esperantology

El la notlibro de praktika esperantisto, K.R.C. Sturmer. Literatura Mondo, Budapest, 1934, 125p. A few copies of this very rare volume available to ELNA members only. bound 3.50  
(Note: Sturmer wrote also under the pen-name "Kenelm Robinson".) paper 2.50

L'Espéranto, Pierre Janton. Presses Universitaires de France (Que sais-je #1511), Paris, 1973, 128p. Comprehensive volume in French on Esperanto from linguistic, literary and historical viewpoints. This sort of volume should be, but is not, available in English. 2.25

Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko, Eugen Wüster (German/Emil Pfeffer). Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, 1975, vii + 130p. + table. Study of terminological standardisation by an authority in the field, with special attention to Esperanto. Reprint; first appeared in Esperanto translation, 1936. New afterword for this edition. 4.50

Les langues internationales, Pierre Burney. Presses Universitaires de France (Que sais-je #968), Paris, 1966 (2nd ed.), 128p. Survey in French of the various ethnic and constructed languages which have been proposed for international use, including Esperanto. Note: Certain misrepresentations of Esperanto which appeared in the first edition and which were, at the time, noted in Esperanto magazine, have been corrected. 2.25

Metodologio de lingvostudado kaj parolalproprigo, István Szerdahelyi. Tankönyvkiadó, Budapest, 1975, 378p. Most important volume on Esperanto pedagogy since Rakuša's Metodiko de la Esperanto-instruado. Printed in an edition of 330 copies, of which ELNA has acquired a limited stock. Probably not available from any other book service. ELNA members only. 5.00

Vivo de Lanti, E. Borsboom. SAT, Parizo, 1976, 274p. Biography of one of the most important --and fascinating-- figures in the history of Esperanto, founder of the class-conscious workers' organization Sennacieca Asocio Tutmonda, which, before the rise of fascism in Europe, rivaled UEA in membership figures. Includes Lanti's autobiographical Fredo. 13.50  
Special price to ELNA members: 12.00

Wanted: a world language, Mario Pei. Public Affairs Pamphlet #434, New York, 1969, 21p. See main booklist, p. 1. New stock unearthed, with new price as well. .45

Zamenhof: Leteroj, edited by Adolf Holzhaus. Fondumo Esperanto, Helsinki, 1975, 329p. Consists of letters not collected by Dietterle (Originala Verkaro) or Waringhien (Leteroj, 2 vol.). Includes index to all three compilations. Illustrated. 15.00  
Special price to ELNA members: 12.50

Learning aids

EIL Esperanto. Set of 16 tapes on 5" reels, spoken by Humphrey and Julie Tonkin and Jonathan Pool. Text by Alvino E. Fantini and John L. Lewine. Used at the School for International Training, a part of the Experiment in International Living. Formerly available on records under title Home Study Course in Basic Esperanto. 100.00

Esperanto Pronunciation Disc, 45 rpm., 7". Spoken by Dr. John C. Wells, Lecturer in Phonetics at University College, London. With text. (New pressing, old price!) 1.00

Kiu kion scias?, Helena Honesta. Paco Esperanto-Rondo, Szeged, 1967 (3rd ed.), 15p. 145 simple questions and answers, mostly on Esperanto and its history. .75



## Fiction

- La balenodonto, Jack London (English/William Auld). F. Maitland, London, 1952, 11p. Short story about a missionary in the Fiji Islands. (1976 is the Jack London Centennial.) .25
- Brilanta ruĝa stelo, Vang Pejgia (Chinese/Anon.). Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1974, 115p. Picture story of diligent young communist giving his all to the revolution. .50
- La granda aventuro, Ferenc Szilagyi. See main booklist, p. 14. bound 3.00
- Tiel okazis aŭ Mistero minora, Ferenc Szilagyi. Koko, Kopenhago, 1958, 120p. Another hard-to-get item in short supply for ELNA members only. Perhaps Szilagyi's finest work, a short mystery novel with an ironic twist. bound 4.50

## Non-fiction

- Enkonduko al Ŝekspiro, P. Janton. SUK (Someraĵ Universitataj Kursoj), Liège, 1975, ii + 68p. Overview of the various branches of Shakespeare studies. 6.00
- Enkonduko en organikan kaj biologian kemion, S. Kawamura. SUK, Liège, 1974, iii + 89p. 9.00
- Fundamentaj konceptoj en kemio, S. Kawamura. SUK, Liège, 1974, 79p. 8.00
- La nuna stato de l' evoluismo, Jean Rostand (French/J. & M. Delacourt). SAT, Paris, 1950, 113p. Basic concepts of modern evolutionary theory. 1.50
- La Zamenhofa Esperanta Koktelaro, Afar ben Ĥaci-ĵi. Kirklanda Esperanto-Centro, Kirkland, 1975, 8p. 20 recipes: Cunamo, Sanga Maria, Norda Prismo, Tekila Tagigo, Sabraino, etc. .50

## Poetry

- Kalevipoeg, Friedrich Reinhold Kreutzwald (Estonian/Hilda Dresen). Eesti Raamat, Tallinn, 1975, 89p. Brilliantly translated excerpts from Kalevala-like epic poem. 2.00
- La lando de Alvargonzález, Antonio Machado (Spanish/Fernando de Diego). Hispana Esperanto-Federacio, Zaragoza, 1969, 47p. Dramatic poem-cycle of Spanish peasant life. 3.00

## Mixed Literature

- De oriento al okcidento, edited by Jože Kozlevčar. Slovenia Esperanto-Ligo/Kroatia Esperanta Junulara Asocio, Zagreb, 1976, 236p., mimeo. Large format. Wide-ranging compendium of Esperanto literature. A great deal of material for the price, although mimeographing leaves a bit to be desired in a few places. 5.25
- Portoj de l' vivo, Vilho Setälä. Fondumo Esperanto, Helsinki, 1967, 208p. Articles (largely on the Esperanto movement and language), poems, and translations, mostly photocopied from the various periodicals in which they first appeared. 3.00

## Songs

- Sesdek tradiciaj popolkantoj de Japanujo (Japanese/K. Matuba). Amo-Akademio, Kôzôzi, 1967, x + 137p. With music. Stiff covers. 4.25

## Religion

- Biblia studplano. Kristliga Esperantoförbundet, Östansjö, 1971, 16p. Recommended Bible readings (almost all New Testament) for each day of the year. .50
- Ekumenismo kaj internacilingva problemo/Language and ecumenism, Georgo J. Korytkowski. International Union of Catholic Esperantists (IKUE), Zürchersmühle, 1973, 176p. Series of articles on the language problem and Esperanto, each with summary in English. 5.20
- Katolika preĝaro. IKUE, Romo, 1975, 104p. 62 prayers, including some psalms. 2.60
- Mi amis junulinon, Walter Trobisch (French/Adolf Burkhardt). See main booklist, p. 16. bound 2.75
- Ordinara parto de la Meso. 7p. Ordinary of Catholic Mass, translated "kun Eklezia aprobo". .50

## CRD Documents (from Center for Research and Documentation on the World Language Problem)

- The Language Problem in International Relations, Ivo Lapenna. 1972, 12p. 1.00
- Outline of the History of Esperanto in China, Ulrich Lins. 1973, 2p. .15
- Science, Technology and Language, K. J. Young. 2p. .15

## Miscellaneous

- Hungara Vivo, #6, 1975. 32p. Special issue dedicated to poet Lajos Tarkony (also known as Ludoviko Totsche), author of Soifo and De paĝo al paĝo. Articles by Benczik, Kalocsay, Tarkony himself. Good sample of excellent periodical (bimonthly, \$6/yr.). 1.25
- Jarlibro cover. Plastic protector for oft-consulted yearbook-directory of UEA or SAT. 1.00
- SAT insignia pin. For members of Sennacieca Asocio Tutmonda. Green star in red circle. .85
- Shortwave listener's postcards. To inform stations of audibility and clarity. 15¢ or 20/12.25

## ZIGZAGE TRA ESPERANTUJO

De nun esperantistoj en aŭ apud Filadelfio povos utiligi telefonservon por informoj pri lokaj Esperanto-agadoj ĉe (215) 722-2878. La servo celas ankaŭ ebligi buŝan ekzercadon en la lingvo por komencantoj, sciigi interesitojn pri la internacia lingvo, kaj informi vizitantojn pri vidindaĵoj filadelfiaj.

Ĉe la maja kunveno de Esperanto-Societo de Vaŝingtono (DC) prelegis d-ro William Solzbacher pri la problemo "ata-ita." Societano Affonso Henriques Correa lastatempe ricevis komision de UEA por flegi rilatojn kun la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj.

Kurson pri Esperanto ofertas arkivisto d-ro B.J. Balcar ĉe University for Man en Monterey CA.

Ĉe la marta kunveno de Esperanto-Societo de Portland OR, George Roberts recenzis diversajn librojn por literatura vespero. En aprilo Joe Gamble parolis pri sia amata ĉevaĵeto, nomoj en Esperanto. Estas menciinde ankaŭ, ke la kurskompleto *A First Course* de William Auld estas alirebla ĉe la lingvolaboratorio de Portland State University. La kurso konsistas el lernolibro kaj sonbendoj.

Unuhoran lecionon en Esperanto ĉe kurso pri lingvoj por vojaĝado faris Eugene H. Thompson, Jr., ĉe Guilford State College (Greensboro NC), kiel gastpreleganto, en marto.

Tre bona artikolo pri la internacia lingvo aperis en la ĵurnalo de Pensilvania Ŝtata Universitato, 1976.02.06, dank' al ligano Neal McKown.

Amaso da informpetoj venis al la Centra Oficejo rezulte de artikolo de Annette Greenland, "International Language Can Aid Information Exchanges", en *The Genealogical Helper*, marto 1976. Ĝi kompreneble emfazas la utilon de Esperanto en geneologiaj esploroj.

Informpetoj alvenis ankaŭ rezulte de letero al la redakcio de la organo de Diners' Club, *Signature*, februaro 1976. La leteron skribis korespondserva estrino Ellen A. Lewis, responde al elĉerpaĵo de *The People's Almanac* pri Esperanto (vd. aliloke en ĉi tiu numero).

Lastatempe formiĝis Seatla Esperanto-Societo en Vaŝingtonio. Ĝi eldonas bultenon kaj kunmetas ampleksan kluban bibliotekon. En la marta-aprila numero de la bulteno aperas artikolo pri internaciaj numeralprefiksoj.

Dum la unua semajno de aprilo Karl Nell de Rochester NY deĝoris ĉe Esperanto-budo en ekspozicio pri lingvolernado, aranĝita de la lokaj fremdlingvaj instruistoj.

Ĉe la maja kunveno de la koloradiaj esperantistoj, Jacqueline Reynolds faris prezentaĵon kun la titolo "Ĉoĵa Afero."

En aprilo, Roan Orloff Stone efike varbis per prelego al la vicestro kaj kelkaj instruistoj de lernejo por indianaj infanoj en Rough Rock AZ. Ŝi nun instruas Esperanton al la vicestro kaj unu instruisto. Ankaŭ al emerita kantgrupo en Albuquerque NM ŝi prelegis, kun helpo de Charlene Baker, kiu tie varbis ses lernantojn.

George Lockhart parolis pri Esperanto al kurso de kompara lingvistiko ĉe Schoolcraft Community College (Northville MI) ĉi-aprile laŭ peto de la instruisto.


Esperanto-Societo de Ĉikago bone festis Semajnon de Internacia Amikeco, akirante proklamojn pri ĝi de urbestro Richard J. Daley kaj ilinojsa ŝtatestro Dan Walker. Ĉe sia marta kunveno la societanoj ĝuis novaĵojn pri la lastatempe renaskiĝinta portugala movado de portugala gasto Pastro Gabriel, kaj prelegon de Byron Eiguiguren, Direktoro de Blindullernejo Hadley.

La aprila kunveno de SFERO (San-Francisko CA) inkluzivis lumbildojn pri ĉi-jara UK-urbo Ateño, originalajn kantojn de Fabio Torres, kaj omaĝon al Kalocsay fare de Karl Pov kaj Mark Mandel.

Omaĝon al Kalocsay faris ankaŭ hungara elmigrinto Sandor Bako ĉe Esperanto-Klubo de Los Angeles en majo. Tiun

kunvenon distingis grava teĥnika novaĵo, nome simultana interpreto en la anglan aŭskuteblan per ordinara frekvencmodulada (FM) radio. Klubano Germaine Chomette priskribis ĝin en artikolo en *Los Angeles Times*, sub la rubriko "Postscript", 1976.05.10. Temis pri retrospektivo al artikolo aperinta en 1954 pri la esperantista familio Chomette.


En marto okazis interkonatiĝa vespero por esperantistoj kaj interesitoj ĉe la biblioteko de Fort Worth TX. La kunvenon organizis studento Michael Jones, filo de Esperanto-aktivulo R.Kent Jones de Ĉikago. Io en la sango, evidente....



S-ro Affonso Henriques Correa (maldekstre), nun speciala komisiito de UEA. (Kun li staras Sergio Docal.)

## MALFERMU VIAN HEJMON

al alilanda studento! Se vin interesas la ebleco gastigi alilandan studenton dum unu monato, por kutimigi lin/sin al la usona vivo prologo al formalaj studoj ĉe usona universitato, skribu angle al Experiment in International Living, Brattleboro VT 05301.



Timothy J. Ryan, 21-jara asekuristo kaj studento ĉe UCLA, lastatempe elektigis prezidanto de Esperanto-Klubo de Los Angeles.

## VIZITO EN PARADIZO

[Raporto farita de ELNA-ano Jack Lesh de Alasko]

Imagu al vi fabelan landon kie la suno brilas preskaŭ ĉiam sed la temperaturo estas milda, inter 22°C kaj 26°C (70°-80°F). La seka aero tute ne konas poluon. Ĉe la oftaj riveretoj plenaj de pura akvo abunde kreskas mangoj, bananoj, oranĝoj, ananasoj kaj aliaj fruktoj; pli alte troviĝas kampoj de rizo, maizo, kafo, kaj legomoj kaj traktile paŝtas ĉevaloj kaj bovinoj. De ĉiu direkto montetoj alvokas por suprengrimado. Paradizo? Fakte, jes; alta paradizo — la vilago Alto Paraiso, Brazilo, en la ŝtato Goias, 250 kilometrojn norde de la moderna ĉefurbo Brasilia.

Tie en la sovaĝa Chapada de Veadeiros (Montaro de Cervcasistoj) antaŭ 18 jaroj fondis kelkaj brazilaj esperantistoj orfejon kaj lernejon por prizorgi orfajn kaj malriĉajn knabojn. Hodiaŭ ilia revo, Bona Espero, ankoraŭ funkcias, kvankam la fondintoj ne plu aktivas kaj la etoso ekinternaciigis antaŭ du jaroj, kiam translokiĝis tien de Turino la konata esperantista paro Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia kun siaj du filoj. Post ne longe alvenis la gesinjoroj Melo; Karlo, brazila kuracisto, kaj Ŝigeko, japana flegistino. Ĉi tiuj kvar konsistigas nuntempe ne nur la estraron de Bona Espero sed ankaŭ la laborantaron krom kelkaj lokaj dungitoj. Preter tio la gesinjoroj Melo estas la sola fonto por kuracaj servoj en vasta regiono ĉirkaŭa.

Kvankam Bona Espero situas interne de la limoj de Alto Paraiso, ĝi estas izolita je dek naŭ kilometroj de la vilaĝa centro kaj havas kiel najbarojn nur kelkajn malgrandajn bienojn je kelk kilometraj distancoj. Dum la jaroj oni konstruis diversajn konstruaĵojn el surloke faritaj brikoj, ĉiun unuetaĝan; du domegojn, kokinejon, duĉambran lernejon, kaj diversajn deponejojn kaj meti-laborojn. Antaŭ kelkaj jaroj la registaro pruntedonis buldozon por digi rivereton kaj la rezultinta lageto nun estas naĝejo kaj fonto de doma akvo kiu atingas la loĝejojn per pumpiloj, kiuj ne bezonas energion krom tiu de la fluanta akvo mem. Dum la lastaj jaroj oni ne disponis pri elektropovo ĉar la generatoro kadukiĝis, kaj krom tio, mono por dizeloleo mankas. Oni lumigas per gaslampoj, kuiras per ligno, faras laborojn per muskoloj.

La komplezemaj bonesperanoj gastigis min dum la pasintaj decembro kaj januaro kaj mi tre ĝuis la viziton dum kiu mi provis kompensi per laboro la familian etoson en kiu oni regalis min. Se la vivo tie estas simpla materiale, kompense ĝi pli vastigas spirite. La celo de Bona Espero ŝajnas esti triparta; unue provizi al la enloĝantoj simplan satigan vivon per kiel eble plej kompleta memsufiĉo en la kvarmil akrea bieno. Due provizi al la ĝenerala ĉirkaŭa socio helpajn kaj kulturajn servojn laŭeble; ekzemple per prizorgado de infanoj, kurac-servoj jam menciitaj. Ankaŭ la bonesperanoj lastatempe instigis la registaron establi gimnazion en Alto Paraiso por la unua fojo kaj ili nun instruas en tiu gimnazio. Trie ili celas ke Bona Espero ludu gravan rolon en la tutmonda Esperanto-movado. Ĉi lasta ankoraŭ atendas plenumiĝon. Plej necesas pli da laborantoj. Eble ili baldaŭ ekalvenos; dum mia restado tie ankaŭ vizitis sep eŭropaj esperantistoj kaj aliaj en kelkaj landoj ekinteresiĝas.

Leganto, se interesas vin vizito en Bona Espero — aŭ longa por kunlabori aŭ mallonga por libertempi — mi certigas vin, ke vi trovos bonvenigon tie. Kompreneble skribu antaŭe al Bona Espero, 77260 Alto Paraiso, Goias, Brazilo. Kiu scias, eble ankaŭ vi vekiĝos iun matenon kaj vidos ekster la fenestro emuon (sudamerikan struton)!

## STIPENDIO AKIREBLA

Prof. d-ro Jonathan Pool petis nin ripeti la sciigon en nia lasta numero, ke plena ŝtata stipendio estas havebla al studento de lingvopolitiko, kadre de nova doktora programo pri la politikscienco ĉe la Ŝtata Universitato de Novjorko en Stony Brook. Interesiĝantoj el ĉiuj landoj, kiuj diplomiĝis en iu ajn fako kaj posedas almenaŭ mezajn sciojn de matematiko/statistiko, socia scienco kaj la angla povas informiĝi ĉe Prof. Jonathan Pool, Dept. of Political Science, SUNY, Stony Brook, NY 11794.

## HEREDAĴO BONESPER AL ELNA, UEA, NOVJORKO

Ĵus venis en la kason de ELNA la bela sumo de \$15525,66 kiel heredaĵo postlasita al ELNA de Ralph Bonesper, vaste konita Esperantisto kiu loĝis en Novjorko ĝis la morto en 1971.

ELNA-membro John Lewine, la testamenta plenumanto nomita de Bonesper, kaj ELNA-prezidanto Harmon kunlaboris longe por haki tra la leĝaj komplikaĵoj kaj liberigi la monon el la manoj de la tribunalo de heredinstanco en Novjorko. Laŭ la rezulta aranĝo, UEA ricevis donacon de \$2000, la Novjorka Societo \$500, aliaj \$500 estas destinitaj por ebligi la donacon de proks. 15 PIVoj al indaj Esperantistoj en netranspagipovaj landoj, kaj la saldo de \$15525,66 estis donacita al ELNA.

Tiel bonkora Esperantisto Bonesper, kiu tiom laboris dum granda parto el sia vivo por disvastigi Esperanton en Usono kaj en la mondo, ankoraŭ helpas el preter la tombo per ĉi tiu valorega heredaĵo. Decido pri la eventuala dispono de la heredaĵo estos farita per rekomendo de la Financa Komitato al la Estraro; sed plej eble estas, ke la pligranda parto iros en ŝparkonton por plifirmigi la financon bazon de ELNA per regula enspezo de interezo al la ĝenerala konto, samkiel la seninteresa prunto al ELNA kiun faris Ges-roj Schulze antaŭ kelkaj jaroj, kaj samkiel la kapitalo de la dumviva konto.

\*\*\*\*\*  
RESPONDOJ al RICIGU VIAN VORT-TREZORON!  
1b, 2b, 3d, 4a, 5c, 6c, 7a, 8b, 9d, 10a, 11c, 12d

## NOVAJ MEMBROJ

- |   |           |
|---|-----------|
| 142. Chambers, John B.<br>404 Francisco Ave., El Paso TX 79912          |           |
| 143. Cunningham, Jim<br>17102 - 66 Pl. NE, Bothell WA 98011             |           |
| 144. Del Hoyo, Robert<br>21718 Violeta, Hawaiian Gardens CA 90716       |           |
| 145. Driscoll, Phillip R.<br>12995 Clinton-Manchester, Clinton MI 49236 |           |
| 146. Faucette, Mark<br>4225 Long Branch Ct. NE, Atlanta GA 30319        |           |
| 147. Frascella, Norman P.<br>2180 S. Olden Ave., Trenton NJ 08610       |           |
| 148. Goodall, Grant<br>27 McNear Dr., San Rafael CA 94901               | 147-08610 |
| 149. Petrov, Alfred<br>Rt. 1, Box 890, Escondido CA 92025               | 146-30319 |
| 150. Robertson, Dean A.<br>5512 La Sierra Ave., Riverside CA 92505      | 145-49236 |
| 151. Saxton, M. A.<br>P.O. Box 518, Joshua Tree CA 92252                | 142-79912 |
| 152. Spencer, Thomas H.<br>6510 Oak Manor Plz., Martinez CA 94553       | 156-80302 |
| 153. Vick, Margaret O.<br>1012 Tovole Circle, Vista CA 92083            | 144-90716 |
| 154. Wilkinson, Natasha<br>633 Kirkham H, San Francisco CA 94122        | 149-92025 |
| 155. Williams, Richard J.<br>413 S. Arroyo Ave., Fresno CA 93727        | 153-92083 |
| 156. Wise, Janet<br>1212 Pine St., Boulder CO 80302                     | 151-92252 |
|   | 150-92505 |
|   | 155-93727 |
|   | 154-94122 |
|   | 152-94553 |
|   | 148-94901 |
|   | 143-98011 |

Por trovi novajn membrojn en via regiono, rigardu la koncernajn poŝtkodojn en la dekstra kolono, apud kiuj sidas la korespondaj numeroj de la nomoj en la maldekstra kolono.



Corinne Engelmänn (ĉe mikrofono) estras prezentadon de sia humura poemo ĉe la Kalifornia Esperanto-Konferenco (p. E-3).

## ANONCETOJ

**VAR-ETIKEDOJ** portu ne nur nacilingvan sed ankaŭ esperantan tekston. Tradukservon proponas Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio, poŝtkesto 440, D-718-Crailsheim, F.R. Germanio. Skribu por detaloj.

**ARKIVISTO** de ELNA serĉas muzikaranĝojn por "La Espero" krom tiuj de Ménil, Gregori, Motteau kaj Jasui, kaj detalojn pri esp-istaj verkistinoj Winifred Sackville Stoner, patrino kaj filino. D-ro B.J. Balcar, 62 Via Castanada, Monterey CA 93940.

**VENDI AU INTERŜANĜI** (por *Esperanto en Perspektivo*) jenajn preskaŭ novstatajn librojn volas anonima ligano: *Plena Ilustrita Vortaro, Edinburgh Dictionary, Plena vortaro kun Suplemento, La bambufluto*. Skribu al ELNA, Box 508, Burlingame CA 94010.

**INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO** en Vieno proponas sian kvaronjaran novaĵleteron kontraŭ \$3 jare. Usona peranto: S-ino Roan Orloff Stone, 504 N. Fifth St., Gallup NM 87301.

**BALONO ESPERANTO?** Se vi ŝatus aĉeti filatelajn kovertojn pri la unua flugo de vojaĝbalono aĉetota por uzo en varbado, skribu al Esperanto-Societo Zürich, c/o Fritz Liechti, Carl Spittelerstr. 167, CH-8053 Zürich, Svislando.

■ **EL LA MANIKO:** Kiu volas vendi au interŝanĝi ĉi novelaron de Reto Rossetti skribu al Karl Pov, Box 508, Burlingame CA 94010.

### VOLAS KORESPONDI:

□ 40-jara leterportisto S-ro Yosifumi Okano, Okuradani Aza Shimizu 638-200, Akashi Hyogo pref., Japanio 673. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, monerojn.

□ 36-jara apotekistino Maria Marinova Sidezova, 5500 Yoveĉ, str. Vasil Kolarov 45, Bulgario. Interŝanĝos bildkartojn, librojn, sondiskojn.

□ S-ino Barbara van de Pol, 53-jara, Teresjkovastraat 15, Kromenie, Nederlando, pri ĉiuj temoj.

□ 18-jara lernanto, s-ro Sándor Cseke, H-9944 Bajánsenye, 2. ker. Arany. J. u. 37., Hungario, kun gejunuloj usonaj.

□ S-ro Philippe Delbé, 19-jara, 12 Rue du President Wilson, 62270 Frevent, Francujo. Intereso: rugbeo, futbalo.

□ Lernantoj ĉe instruistino Elisabetta Formaggio, via privata S. Rufino 32, 16043 Chiavari, Genova, Italio.

## KANADAJ ESPERANTISTOJ BEZONAS HELPON

Niaj nordaj najbaroj, la Kanada Esperanto-Asocio petas la helpon de ni Usonaj Esperantistoj. La KEA eldonas frazilbron kiun ili donacos al ĉiuj 11000 Olimpikaj atletoj kaj oficistoj kaj ankaŭ al la 1200 junuloj kiuj ĉeestos la Internacian Junultendumadon ligita al la Olimpikaj ludoj.

La frazilbro estas verkita en Esperanto, la Franca kaj la Angla lingvoj, plus kvara kolono en kiun oni gluos strion kun traduko en diversaj aliaj naciaj lingvoj. La striojn tradukos kaj presigos naciaj Esperanto-asocioj helpantaj.

La broŝuro celas helpi plibonigi komunikadon kaj interkonatiĝon ĉe la Olimpikaj ludoj inter la multaj diversaj lingvanoj kiuj estos tie. Ĝi ankaŭ certe rikoltos bonegan reklamadon por Esperanto, kaj estos publikigita per ĵurnaloj kaj televido-programoj.

Tamen ekzistas problemoj. Subvencioj atenditaj de grandaj kompanioj fiaskis; multaj donacoj venis de Kanadaj Esperantistoj, sed ankoraŭ mankas mono por efektiviĝi la projekton. Je la tempo de ĉi tiu raporto, mankas iom pli ol 1000 dolaroj.

Niaj Kanadaj najbaroj do apelacias al ni por donacoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, por helpi al ĉi tiu tre inda projekto. Donacojn sendu al:

K.E.A., PO Box 174  
Roxboro, Quebec H8Y 3E9, Kanado

[Redakta noto: Kvankam ni ne volas depreni ion de ĉi tiu apelacio, tamen ni devas averti, ke donacoj al eksterlandaj asocioj kiel KEA ne estas depreneblaj je Usona imposto.]

## ALIĜINTOJ AL LA 24A ELNA-KONGRESO (ĝis 1976.06.03)

26 Marjorie J. Ryan, WA. 27 Irma K. Kocher, CA. 28 William R. Harmon, CA. 29 Lucille Harmon, CA. 30 W. F. Millson, CA. 31 Charlotte B. Millson, CA. 32 Peggy D. Linker, WA. 33 Andrew Campbell, MA. 34 Robert E. Bailey, CA. 35 Jack K. Lesh, AK. 36 Sally Lesh, AK. 37 Janet Wise, CO. 38 Miekko Daibuzono, Japanujo. 39 Jerry Carlton, CA. 40 Patricia Egan, CA. 41 Brian Neil Burg, CA. 42 W. Campbell Nelson, CA. 43 Jim Cool, OH. 44 Alberta S. Casey, CA. 45 Charles R. L. Power, CA. 46 Hazel H. Heusser, OR. 47 Hal Dreyer, CA. 48 Michael Ham, IA. 49 Cecelia Ham, IA. 50 Martha A. Walker, CA. 51 Marion E. Bigelow, CA. 52 Germaine Chomette, CA. 53 Cecelia Peterson, CA. 54 James H. Parks, WA. 55 William J. Ford, NJ. 56 Mary Murray, CA. 57 Armin Doneis, TX. 58 Mary Doneis, TX. 59 John L. Lewine, MA. 60 H. Ken Ver Ploeg, WA. 61 Corinne Lawrence, WA. 62 Rose Bean, WA. 63 Barbara D. Colt, CA. 64 William A. Gruneisen, CA. 65 John B. Massey, OH. 66 Yvette Massey, OH. 67 B. J. Balcar, CA. 68 LaVerne Guilfoyle, CA. 69 James Hall, CA. 70 June Hall, CA. 71 David B. Richardson, WA. 72 Minerva Massen, CA. 73 Allan C. Boschen, MA. 74 Joyce Boschen, MA. 75 Robert A. Hawkinson, WA. 76 Mary A. Hammersmith, WA. 77 George Roberts, OR. 78 Eugene H. Thompson, Jr., NC. 79 Lucille H. N. Thompson, NC. 80 William W. Glenny, CA. 81 Mary C. Sears, CA. 82 Doris Vallon, CA. 83 Doris Worcester, Anglujo.

## LUU SONBENDOJN!

Inter la malpli konataj servoj de ELNA estas tiu de ĝia Aŭd-Vida Sekcio, ĉe kiu diligente laboras s-ro H. Ken Ver Ploeg.

Pli ol ducent programoj estas lueblaj por tridek tagoj po unu dolaro. Ĉiuj programoj estas haveblaj sur aŭ kaseto aŭ malfermita bobeno.

Inter la programoj nun haveblaj estas:

4. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Ivo Lapenna (40 min.)

53. Interplaneda vojaĝo, Boĝa Popoviĉ (55 min.)

74. Kolektanto de ĉielarkoj, Tibor Sekelj (35 min.)

139. Lingvaj problemoj, Duncan Charters (45 min.)

153. Klarigoj pri la elparolado, Edmond Privat (10 min.)

164. Debato pri la neŭtraleco de UEA, 56a UK (105 min.)

191. Interparolo: Petro de Smedt kaj William Auld (30 min.)

Plena listo de ĉiuj programoj estas havebla laŭpete al ĉiuj membroj de ELNA ĉe Aŭd-Vida Sekcio de ELNA, c/o H. Ken Ver Ploeg, 321 E. 19th Ave., Spokane WA 99203.